

Михаил Лермонтов,  
La morto de la poeto  
*tradukita de Konstantin Gusev*

...

Михаил Лермонтов,  
Der Tod des Dichters  
*tradukita de Friedrich von Bodenstedt*

...

Pereis li, poet' de justo,  
 Murdita per la kalumni',  
 Kun peza plumbo en la brusto  
 Kaj vengavido mortis li! ...  
 Ne povis la animo luma  
 Subigi al la malhonor',  
 Li sola kontraŭ fals' monduma  
 Ribelis ... Kaj li estas for!  
 Murdita! ... Do por kio ploroj,  
 De l' povraj laŭdoj tarda ĥor'  
 Kaj sinpravigoj de l' sinjoroj?  
 Pro fato li jam estas for!  
 Kaj ĉu ne vi kolere pelis  
 La noblan kanton de liber',  
 Elblovi incendion celis  
 El la ĵaluzo – nur fajrer'?  
 Do ĝoju ... Mutas bardo nia,  
 La bonon rompis la malbon'.  
 Ne lumas plu la stel' genia,  
 Forvelkis la solena kron'.  
 Murdinto lia senkompata  
 Ekpremis feron de la ĉan',  
 La koro vanta batis glate,  
 Neniom tremis tiu man'.  
 Kaj ĉu ne miro, ĉu ne strango?  
 Pelata per la sort' migrant',  
 Nomadis li en nia land'  
 En serĉo de feliĉ' kaj rango,  
 Ofende mokis pli kaj pli  
 De nia tero lingvon, moron  
 Kaj malestimis nian gloron,  
 Ne sciis en la sanga horo,  
 Sur kion levis sian manon li! ...  
 En tombo kušas jam la bardo,  
 Samkiel tiu, kiun li kun ardo  
 Prikantis sorĉe en la versroman' –  
 Kantisto de bonkoro kaj bonfarto  
 Murdita per la senkompata man'.  
 Por kio de la pac' kaj simpla vilaĝloka  
 Enpaſis mise li al la mondum' sufoka  
 Por la sincera sent' kaj liberema sag'?  
 Por kio premis li la malamikajn manojn,  
 En la envia rond' serĉante la kompanojn,  
 Li, kompreinta homojn de l' junag'?...  
 Anstataŭ simpla kron' al li surmetis ili  
 La kronon dornan, nur kun laŭro por ornam' –  
 Ĝi devas kvazaŭ ĉiam brili,  
 Sed kaše piki, piki jam;  
 Venenis liajn lastajn horojn frido,  
 Malica flustro mokis lin, kaj jen  
<http://www.poezio.net/version?poem-id=951&version-id=1917,1918>  
 Li mortis kun la vana vengavido,  
 Kun kaşa disrevigo kaj ĉagren'.  
 La kantoj de mirinda brilo  
 Ne sonas jam sub la ĉiel',  
 Malhelas lia mortazilo

Der Dichter wollte seine Ehre rächen,  
 Die er durch giftges Wort verletzt geglaubt,  
 Da traf ihn selbst das Blei, sein Herz zu brechen,  
 Zu beugen sein gewaltig Haupt...  
 ... Und Manche jetzt frohlocken, daß er fiel,  
 Und rühmen gar den Mörder, der sein Ziel  
 So gut getroffen, und im kalten Muthe,  
 Fest, ohne Zittern, that den Mörderschuß,  
 Der unser Land geröthet, mit dem Blute  
 Des liederreichen Genius...  
 ... Ein Abenteurer kam er aus der Ferne,  
 Er nahm kein Herz mit sich, ließ keins zurück –  
 Rang sucht' er bei uns, Titel, Ordenssterne,  
 Denn unverständlich war ihm andres Glück,  
 Er fand was er gesucht in unsrer Mitte,  
 Er fand bei uns ein zweites Vaterland –  
 Sein Dank war: daß er sonst auf jedem Schritte  
 Was ihm begegnete, verächtlich fand.  
 Fremd blieb er unsrer Sprache, unsrer Sitte,  
 Das Volk war ihm ein Gegenstand des Hohnes,  
 Er suchte keine Gunst als die des Thrones...

*Traduko de la Rusa poemo “Смерть поэта” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de KONSTANTIN GUSEV (†1980-11-09).*

*Arg-951-1917 (2013-12-15 10:56:39)*

*Tiu ĉi poem-esperangigo troviĝas en la retejo [http://donh.best.uwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/morto\\_poetou.html](http://donh.best.uwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/morto_poetou.html).*

*Traduko de la Rusa poemo “Смерть поэта” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (\*1814-10-15 – †1841-07-27) en la Germanan de FRIEDRICH VON BODENSTEDT (\*1819 – †1892).*

*Arg-951-1918 (2013-12-15 20:30:08)*